

& Malbonŝanco:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 665 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:35> (

/Lami mifa mire TiTi; fafa lafa mire TiTi; domi mire doTi LaLa; SoSo SoSo doTi La La;

(#Rekantaĵe: mi mi mi i;fa mire doTi La a; fa fa la fa mi re; mi mi mi i)

)×19)+

(&Strofoj:

'1 En la vilaĝet' Simuris ; Estis granda sensacio: ; Kun azeno enveturis ; Kolportisto Emilio.

(×: **Frap', frap', frap'** ; **Lin venis sur la kap'**, ; **Estis li senkulpa**, ; **Frap', frap', frap'**.)

'2 Kaj dum li negocojn faris ; En la domoj nun sen peno, ; Sole sur la vojo staris ; Veturilo kaj azeno.

'3 La lernantoj alrapidis, ; Ĉar ja estis ĵus tagmeze. ; Ili kriis, ili ridis ; Kaj rigardis nun senĉese.

'4 Ili per diversaj faroj ; Nun ĉikanis la azenon, ; Ili tiris lin je l' haroj ; Kaj tintigis ĝian ĉenon.

'5 Flanke sed knabeto staris, ; Kiu tute ne petolis, ; Ĉikanaĵojn li ne faris, ; Ĉar li nur rigardi volis.

'6 Jen la kolportist' revenis, ; Kaj la knaboj lin ekvidis; Ili tuj la librojn prenis ; Kaj kriante forrapidis,

'7 La knabeto sed atendis, ; Ĉar rigardi plu li volis. ; Tute ne li timon sentis, ; Ĉar li fakte ne petolis.

'8 Sed la viro alrapidis ; Kaj lin kaptis sen kompatio; Ĉar aliajn li ne vidis, ; Punis lin li per vang-bato.

'9 La maljusta vangofrapo ; Sed la knabon tre teruris, ; Kaj li kun ruĝega kapo ; Tuj en la lernejon kuris.

'10 Volis li rapide iri ; Al sinjor' la instruisto ; Kaj plendante al li diri, ; Ke lin batis la vendisto.

'11 Sed ĉar li doloron sentis, ; Ĉar li estis afliktita, ; Li nenion plu atentis ; Dum kurad' la senhezita.

'12 Trans ŝtuparon li rapidis, ; Kapon li antaŭen tenis; Sed la pastron li ne vidis, ; Kiu ĵus malsupren venis.

'13 Kaj li puŝis senatente ; Kontraŭ l' pastro sian kapon, ; Kaj ricevis sammomente ; Li de Ĥ pastro vangofrapon.

'14 "Ho, atentu vi pli bone! ; Tute blinde vi nun iris!" ; Per kolera voĉ' admone ; Jen al li la pastro diris.

'15 Plenĉagrene, konsternite ; Li nun en la ĉambron iris, ; Al la instruist' rapide ; Per singulta voĉ' li diris:

'16 "Ho sinjor', la pastro batis ; Sur ŝtupar' min dum alveno, ; Kvankam mi ne petoladis ; Kontraŭ tiu ĉi azeno."

'17 Tuj post kiam tiel plendis ; Li malgajan sorton sian, ; Li sur sia vango sentis ; Jam fortegan baton trian.

'18 "Ne parolu tiel stulte ; Kaj atentu pri konveno, ; Kaj ne nomu vi insulte ; Vian pastron je azeno!"

'19 Se la sorto persekutas, ; Devas cedi homa forto. ; Kiel ajn eĉ hom' kondutas, ; Ĉiam venkas lin la sorto.)